

# EKO 2025

Bleko  
kun eĥo

EKO 2025-07. Februaro 11. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: Sume 300 KB

## La Jaro de la Serpento jam alvenis

La 28-a de januaro, laŭ la huna aŭ ŝjaa kalendaro aperinta antaŭ 4000 jaroj, estas la fino de la jaro de la Blua Drako, poste estos la unua tago de la jaro de la Ora Serpento. Laŭ la tradicio en la fina tago oni bondeziras unu aaaaal la alia por la sekva jaro. Jen mi bondeziras al ĉiuj IKEF-anoj prosperon en la sekva jaro de la Ora Serpento! Precipe al la anoj en Ĉinio, Koreio, Japanio, Vjetnamio, Mongolio, kiuj ankaŭ uzas la hunan kalendaron.



Klimatologie antaŭ 4000 jarojn orientazio estis tropika regiono kun vaste ĝangalaj arbaroj kaj lagaroj kun krokodiloj (origina drako) kaj serpentoj, elefantoj, simioj k.a. La Orient-azia kulturo naskiĝis en tia tropika tempo, kaj signis tiujn tropikajn bestojn, kvankam tiaj bestoj delonge migris al Sudorienta Azio. Tio sugestas, ke la Orientazia kulturo havas tropikan genotipon, kaj ekde 1900 danke al la temperatura altiĝo la regiono progresas.

Ĉielismo, Ĉinio



## Denove, la Tago de la Gepatra Lingvo

Jen la mesaĝo de UEA portiu Tago (21 februaro):

<https://esperantoporun.org/eo/internacia-tago-de-la-gepatra-lingvo-2025/>

Se vi tradukos la tekston kaj sendos la rezulton al Rafael Lima, li aldonos ĝin al nia retejo Esperantoporun.org. Skribu al:

[unesperante@gmail.com](mailto:unesperante@gmail.com)

Humphrey Tonkin

## La februara ondo

Antaŭ 130 jaroj, la 1-an de februaro 1895 naskiĝis **Ferenc Szilágyi**, aŭtoro de kvar novelaroj kaj de la romano *Tiel okazis, aŭ Mistero minora*; fondinto kaj redaktoro de la revuo *Norda Prismo*. Legu la liston de la jubileoj kaj memordatoj por februaro, kompilitan de A. Korĵenkov, ĉe <https://sezonoj.ru/2025/02/februaro-10/>

## Lerte al Brno certe, sed eble bicikle?

Ĉu vi planas bicikli al la venonta UK en Brno? Vi povus bicikli kun aliaj kaj sperti la unikan etoson de BEMI-karavano! Sendu ideon pri startloko kaj longeco de etapoj al BEMI: [bemi-estraro@tejo.org](mailto:bemi-estraro@tejo.org). Ni kunordigos la proponojn por formi unu aŭ du mojosajn karavanojn. Amike kaj bicikleme.



Lars Sözüer, Ĝenerala Sekretario de BEMI

**SMG** insistas poluri sian poezian licencon, kun jena rima aŭ krima rezulto:

Estos skandalo, se okazos forfalo  
Ricevota estas medalo pro l'agad' ĉe pedalo  
Aŭdeblos fortega malbeno  
Pro difekt' ĉe la ĉeno – ja terura la sceno  
Efikos la puŝaj faktoroj tra multe da horoj  
Ĝis finaj la gloroj – post abundo da ploroj  
En rava diurno - alveno al Brno!

## Volontuloj por la UK serĉataj

Subvencioj por partopreni la UK-on estas haveblaj el la Fondaĵo *Partoprenu UK-on* de UEA. Pere de ĝi UEA havas la eblon subteni ĉefe la aliĝkotizojn de kelkaj kongresanoj, en kelkaj kazoj ankaŭ la manĝo- kaj loĝad-kostojn, preferinde en la plej malaltaj kategorioj, kaj en esceptaj okazoj la vojaĝkostojn. Homoj el iu ajn lando, kiuj deziras volontuli kaj bezonas tian helpon, povas kandidatiĝi por subvencio.

La kondiĉoj por kandidatiĝi al la subteno *Partoprenu UK-on* estas:

1. esti preta ricevi kaj realigi kongresrilatajn taskojn antaŭ, dum kaj post la UK;
2. esti individua membro aŭ akcepti esti individua membro de UEA;
3. plenigi ĉi tiun [formularon](#) ĝis la limdato, **la 28-a de februaro 2025**.

Laŭ gazetara komuniko de UEA

## La renoma itala kongreso jam invitas

La 91-a Itala Kongreso de Esperanto okazos en Salsomaggiore Terme de la 23-a ĝis la 30-a de aŭgusto 2025. Jen renkontiĝoj, seminarioj, kursoj, koncertoj, ekskursoj kaj amuzo atendas vin. Ni organizas apartan programon por infanoj (5-13-jaraĝaj), tiel ke la gepatroj povu trankvile ĝui sian kongreson. **Avantaĝoj por familioj:** Rabatoj por la 3-a kaj 4-a lito; la 7-a tago estas senpaga. Infanoj dormas kun vi, sed manĝas, ludas kaj lernas en apartaj ejoj de la kongresejo, proksime al vi. **Senpaga aliĝo por infanoj**, kaj por la tuta infana programo nur simbolprezo de €120 por la tuta semajno. Ĝuu la prelegojn kaj spektaklojn, sciante ke viaj infanoj estas en bonaj manoj! Sub la gvidado de instruistoj, profesiuloj de la infana mondo kaj volontuloj, viaj junaj esperantistoj ĝuos tagojn plenajn je ludo, lernado kaj amikeco kun samaĝuloj el la tuta mondo.

Aliĝu: [kongreso.esperanto.it/91](http://kongreso.esperanto.it/91). LKK donas informojn: [kongreso@esperanto.it](mailto:kongreso@esperanto.it)

Prof. LAURA BRAZZABENI, Presidente FEI: ŝiaj mesaĝoj portas la sekvon:



**SMG:** Pri la itala kongreso ni jam raportis en EKO 3.

## Junuloj kune en Katalunio

Kataluna Esperanto-Junularo invitas vin al sia aranĝo, de la 20-a ĝis la 23-a de februaro 2025 en Olot, en la gastejo *Alberg Olot Xanascat*. RenKEJtiĝo estas la oficiala aranĝo de Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), por junaj esperantistoj kaj de Katalunio kaj de ĉie. La nomo estas vortludo kun la Esperanta vorto 'renkontiĝo' kaj KEJ, la mallongigo de la asocio. Pliaj informoj:

<https://www.esperanto.cat/junularo/la-renkejtigo/>

Fonto: BIT-bulteno 98

## Internacia Kongresa Universitato (IKU) en preparo

UEA nomumis kiel rektoro de la 78-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) okazonta dum la UK en Brno (Burno) Prof. Vera Barandovska-Frank, ĉeĥinon, klasikan filologon studintan en Brno, profesorinon de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). La limdato por sendi proponojn por IKU estas la **31-a de januaro 2025** (**SMG:** sed eble plilongigota). La roponoj estu sendataj al la IKU-sekretario ([amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il)). Lige kun la IKU okazos studsesio de AIS kaj la Scienca Kafejo (SK) kiu konsistas el mallongaj (ĉ. duonhoraj) prelegoj, pli popularnivelaĵoj. Kandidatoj por IKU-prelego povas proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu IKU-prelego, 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameneto. Eblos prelegi defore per *Zoom*; ĉeestaj prelegoj estos preferataj.

## Esperantologia Konferenco en la UK

Ni alvokas por partopreno en la **47-a Esperantologia Konferenco (EK) de CED**, sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). La aranĝo okazos kadre de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno, Ĉeĥio. La programo enhavos plurajn dudek-minutajn referaĵojn elektitajn el inter la ricevitaj proponoj, kun fina rondotablo pri la nunaj esploraj defioj de esperantologio rilate al la traktitaj temoj. Ni bonvenigas proponojn de Esperanto-rilataj esplorobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, ekonomiko, juro, antropologio kaj literaturaj studoj; ankaŭ interfakaj proponoj bonvenas. Aparte bonvenaj estos proponoj kiuj analizas aspektojn de Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko rilate al la kongresa temo: Esperanto kaj teĥnologioj. Surbaze de la prezentoj, elektitaj tekstoj, redaktitaj de la aŭtoroj por publikigo, aperos en la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies*.

**Ni invitas fakulojn – precipe junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn – sendi proponojn** pri referaĵoj. La proponoj, enhavantaj inter 150 kaj 200 vortojn, devas esti senditaj al la retadreso [ek47@interlingvistiko.net](mailto:ek47@interlingvistiko.net).

La limdato por proponoj estas la **30-a de aprilo 2025**. Por konsulti la programon de antaŭaj konferencoj, vizitu [la retejon de CED: https://interlingvistiko.net/](https://interlingvistiko.net/).

Klaus Schubert kaj Bengt-Arne Wickström, Organizantoj de EK 2025

## Unesko-Kuriero

‘La profunda heredaĵo de sklaveco’ estas la ĉefa temo de *Unesko-Kuriero* (julio-aŭgusto 2024). Ĝia Esperanta eldono estas senpage elŝutebla en la retejo de UEA.

## Verda Majo en grava artikolo

En januaro aperis du-paĝa artikolo en la tutlanda ĵurnalo *Mainiĉi* (**SMG:** Hodiaŭa tago) pri Verda Majo (s-ino Hasegaŭa Teru), kiu agadis en Ĉinio antaŭ la dua mondmilito. Ŝi edziniĝis al ĉina studento kaj sekrete translokiĝis al Ĉinio, kaj kune kun sia edzo agadis kontraŭ la japana invada milito en Ĉinio. Jen eseo pri ŝi verkita de s-ino Iŝikaŭa Tiekō. Ŝi prelegis pri Verda Majo en la ILEI-konferenco en 2023.

<https://saitama.esperanto-rondo.net/bulteno/5702/>. Parto 1 de la artikolo. [Parto 2](#). [Parto 3](#). [Parto 4](#).

HORI Jasuo, Retadreso: [horizonto@r.water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@r.water.sannet.ne.jp)

## Semio agas ĉinie

Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio fondis Tutmondan Centron pri Informo kaj Kulturo de Esperanto kun la promeso de la registaro kaj okazigis la inaŭguran ceremonion en la 26-a de decembro. Mi petas vin sendi al ni gratulan mesaĝon. Tio gravas por konvinki lokajn gravulojn subteni nian movadon. retadreso: [semio@163.com](mailto:semio@163.com)



Semio el Zaozhuang-a Universitato

## Ĉeĥio kaj Ĉinio ligataj

Miroslav Malovec loĝas en urbo Brno, kiu gastigos la Universalan Kongreson, kaj estas la redaktoro de revuo *Starto* de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Pro li alvenis al la Muzeo de Esperanto en Zaozhuang la skanitaĵoj de grava korespondado inter lia samlandano Tomáš Pumpr kaj la ĉina samideano Li Laŭjon. En 1951, pere de alia samideano, alvenis al Pumpr la unua letero el la urbo Tianjino, sekvata tuj poste de ekzemplero de *La juĝo*, libro en kiu Li Laŭjon ĉinigis kaj kolektis ĉeĥajn poemojn, tradukitajn pere de Esperanto. Tio estis la komenco de interŝanĝo cele al la kreado de literarura ponto inter Ĉinio kaj la tiama Ĉeĥoslovakio. En tiu ĉi intervjuo por



Ĉina Radio Internacia Miroslav konsentis paroli pri tiu historia korespondado kaj la rolo de Esperanto kiel ponto.

## Tumultoj en Kongo DR

De Honoré Sebuĥoro venis mesaĝo pri la invado kaj la mortigado fare de M23-ribeluloj; el kie mortis liaj familianoj. Tieaj esperantistoj tremas, ne scias kien iri, nur ĉiesan preĝon ili bezonas.

===== vortoj: 1380 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

## La kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.